

**René-William Perrenoud okdekjaras.**  
Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 1984 decembro 20 kaj 22.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-136/Radiokasedo-136-2-856-1985-januario-Claude-GACOND-Rene-William-Perrenoud-okdekjaras.mp3>

Cl.- Vi aŭdas elsendon de de Svisa Radio Internacia. Hodiaŭ Claude Gacond prezentas al vi la plej malnovan aktivan esperantiston de Svislando, s-ron René-William Perrenoud, kiu plenumas la funkcion de librotenisto de Kultura Centro Esperantista nelacigeble ekde 1968. Ĉiaŭtune li fariĝis okdekjara kaj konservis sian viklecon, kiel vi konstatos. S-ro Perrenoud, mi donas al vi la parolon por saluti niajn geaŭdantojn.

P.- Mi salutas vin, aŭskultantojn de la elsendo de s-ro Claude Gacond. Se li celadas la kreadon de Kultura Centro Esperantista, kaj tagnokte laboradas por ĝin vivi per trafikaj ekipaĵoj de la sep domoj de Gastejo Edmond Privat, li tamen kaptis la okazon de mia okdeka naskiĝtago por rigardi malantaŭen al la unuaj paŝoj de la esperantismo en nia regiono. Mi fakte fariĝis okdekjara, sed imagu, ke antaŭ sepdek sep jaroj mi jam kantis fervore kun mia fratino ĉe lokaj kunvenoj: "En la mondon venis nova sento".

Cl.- Vi do havas sepdeksep jarojn rilate al via esperanto-vivo, aŭ kiel diras la esperantistoj, vi estas denaska esperantisto, ĉu ne?

P.- Jes vi preskaŭ pravas. Mia patrino praktikis la lingvon ekde la komenco de la jarcento. Mi sekvis ekde 1907. Ni ne estas nombraj, tiaj olduloj de esperanto. Tamen, mi konas du personojn en Svislando, kiuj certe meritis la palmon antaŭ mi: sinjoron Félix Ducommun kaj sinjorinon Wenger, la patrino de la prezidanto de la Esperanto-Societo Neuchâtel. Ambaŭ estas 93-94 jaraj kaj komencis babili esperantlingve je la ekiĝo de la jarcento.

Cl.- Kie vi loĝis en via infaneco?

P.- Tiutempe mi loĝis en urbeto, Le Locle, tute proksime de La Chaux-de-Fonds, sed ne pli ol unu kilometron for de la landlimo kun Francio. Tuj kiam oni eksciis ion pri esperanto tra Parizo, troviĝis scivoluloj por malkovri tiun strangan lingvon, kiu intencis amikigi ĉiujn popolojn. Estis do jam antaŭ la Bulonja Kongreso de 1905. Eĉ nia Svisa Esperanto-Societo fondiĝis antaŭe en 1903 en Rolle, en la franca parto de Svislando. Aktivaj grupoj fondiĝis en la ĵurasa montaro, interalie en Le Locle kie mi vivis, kaj en Neuchâtel, urbeto 30 kilometrojn for, ĉe la bordo de bela lago, kie mi nun loĝas en la vilaĝo Hauterive.

Ambaŭ grupoj kunvenis ĉiujare kune, ĉu sur meza vojo, sur monto, pasejo aŭ en vilaĝo. Mia patro, kiu estis teknikisto, posedis grandajn fotoaparatojn, per kiuj li fotis tiujn kunvenojn de 60 ĝis 65 personoj, inter kiuj mi fiere tenis la stelan flagon.

Cl.- Bonvolu rakonti al ni, kiel disvolviĝis tiuj renkontiĝoj

P.- La societoj migris per grandaj ĉaroj, kiujn oni kutime uzis por transporti meblojn. Oni aranĝis benkojn sur ili, kaj du ĉevaloj tiris tiujn veturilojn. Ĉar estas fortaj deklivoj por iri de unu valo al la apudaj, la viroj kutimis marŝi, kiam la ĉaro devis supreniri. Tio malŝarĝis la ĉevalojn. Mi retrovis fotojn de tiaj renkontiĝoj por la jaroj 1906, 7. 8 kaj 10.

Cl.- Ĉu vi povus prezenti al ni vian familion?

P.- Mia patrino, kiu nomiĝis Louise Jeanneret, naskiĝis en Ameriko, ĉar mia avo provis fariĝi koloniano en Norda Karolino en Usono. Ŝi parolis la anglan kun sia patrino kaj la francan kun la patro. Ili revenis al Ĝenevo en 1891, ĝuste kiam Svislando festis por la unua fojo sian nacian tagon, kiu estis ankaŭ la naskiĝtago de mia patrino!

Cl.- Tiu tago estas la unua de aŭgusto.

P.- Ŝi eniris la lernejon nur 11-jara, kaj fariĝis instruistino 7 jarojn poste. Ŝi eklernis esperanton graveda je la tria infano kaj sukcesis la superan ekzamenon de Svisa Esperanto-Societo en 1907 en Friburgo.

Cl.- Ĉu vi ankoraŭ memoras pri la esperanto-praktiko en tiu epoko?

P.- Mi ne havis la impreson, ke la lingvon oni uzis por paroli, sed estis seriozaj kunvenoj por diskuti la aplikadon de la lingvo al ĉiuj parolturnoj de la franca lingvo. Oni ankaŭ multe legis kaj mi memoras, ke mi ofte iris de domo al domo por porti aŭ preni gazetojn, kiuj rondiris inter la grupanoj.

Cl.- Inter tiuj gazetlegantoj troviĝis la familio Ducommun, ĉu ne?

P.- Jes, kaj la naŭdekkvarjara Félix Ducommun rakontis al mi, ke lia patro tre firme postulis de la gefiloj, ke ili lernu kaj parolu esperanton. La patro Edouard Ducommun estis instruisto. Li estis aŭdaca homo ĉiam preta por akcepti novaĵojn. Li eĉ riskis proponi simpligon de la franca skribmaniero forlasante, kiel en esperanto, la duoblajn konsonantojn en la vortoj. Li skribis sian nomon Ducommun kun unu 'm', anstataŭ meti du konsonantojn 'm', kiel la ortografio volas. Pruviĝis, ke ŝanĝi lingvon estas eraro, sed ke krei novan povas sukcesi.

Cl.- Vi tre verŝajne revizitas vian infan-regionon.

P.- Jes, kaj antaŭ kelkaj semajnoj, meze de aŭtunaj koloroj, mi promenadis piede la mirindan vojeton, kiu laŭiras la lageton disigante Francion de Svislando. Sur roko apud la vojo troviĝas verda stelo pentrita de sinjoro Edouard Ducommun, kiel oni klarigis al mi antaŭ 70 jaroj.

Cl.- Kaj esperantisto de la vilaĝo Les Brenets, s-ro John Thum, kiu estas domfarbisto, ĝin repentis, kiam li konstatis antaŭ dek jaroj, ke ĝi tendencas malaperi.

Rakontu eble pri via lernado de la lingvo.

P.- Mi mem ne lernis esperanton tiam; esti afero de kleruloj. Sed ankoraŭ nun mi retrovas kun plezuro tradukitajn paĝojn de klasikaj verkoj franclingvaj en "La Revuo", kiuj datumas de tiu periodo. En 1916, mia tiama lernejo-instruisto s-ro Paul Humberstet, invitis min sekvi vesperan kurson de esperanto, kiun li gvidis. Por tio li faris specialan peton ĉe la lernejoj instancoj, ĉar mi estis tro juna por normale ĉeesti vesperkurson. Tamen la sekvan vintron li invitis min same al sia instruado de la itala lingvo.

Tiam ni vivis dum la unua mondmilito. Vintre mia patrino gvidis kurson por blindaj francaj soldatoj, kiujn verkistino loĝanta en la najbara vilaĝo Les Brenets, s-ino T. Combe, gastigis ĉe si por realkutimigi ilin al vivebla vivo.

Mi komencis en la lernejo lerni la germanan, poste ankaŭ la anglan. La unuan mi sufiĉe bone akiris, ĉefe per personaj streboj. Mi pasigis dufoje somerajn feriojn en Germanujo (en Baden-Baden kaj Bremen) per interŝanĝo de junuloj, sed mi troviĝis preskaŭ ĉiam sola kaj luktis per ĵurnalo kaj vortaro por lerni kiel eble plej multe. Poste mi tamen restadis du jarojn en Bazelo, kie kamaradoj helpis min akiri la parolatan lingvon.

Mia esperanta aktiveco komenciĝis poste. Mi studis en gimnazio kaj poste en la universitato. Poste mi vivis en norda Francio dum ses jaroj kie mi profesiis kiel sekretario direktora en fabriko. En 1935 mi revenis hejmen por helpi mian patrinon, kiu estris privatan lernejon, kie oni instruis la francan lingvon kaj la dommastrumadon al junulinoj, kaj tio fariĝis mia fako dum 35 jaroj. Mi memoras, ke mi metis en mian poŝon la lernolibron de Edmond Privat, kiam mi veturis al la ofico, kie mi militservis je la komenco de la dua mondmilito, en 1939.

Cl.- Tiam komenciĝis via esperanto-kariero, ĉu ne? Pri ĝi kaj pri viaj ideoj koncerne la rolon, kiun povus ludi esperanto en Svislando, ni aŭdu vin alian fojon.

Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond babilis kun s-ro René-William Perrenoud, la plej malnova aktiva esperantisto en Svislando. Ĝis reaŭdo!